

Stadt Herzberg am Harz

Lonau
Pöhlde
Scharzfeld
Sieber

... die Esperanto-Stadt
... la Esperanto-urbo

SALUTO AL UK KOPENHAGO

Altestimataj Kongresaj Moŝtoj,
Sinjoro Prezidanto,
Karaj gekongresanoj,

Herzberg, la Esperanto–Urbo, kies urbestro mi havas la honoron esti, spirite partoprenas en la 96-a Universala Kongreso de Esperanto en la bela Kopenhago kaj deziras, ke la Kongreso signu plian energian svingon por la progresigo de la internacia lingvo en la mondo.

Herzberg situas en la koro de Germanio kaj de Eŭropo, kaj ĝia nomo signifas “Kor–monto“: pro tio, ĝia natura loko estas en la koro de ĉiuj amikoj de Esperanto, ĉie sur la terglobo. Reciproke, mi certigas vin, ke Esperanto ĉiam nestas en la koro de Herzberg, ne nur kiel abstrakta ideo, sed ĉefe kiel praktika ĉiutaga realaĵo.

Hodiaŭ Herzberg salutas vin, karaj gekongresanoj. En baldaŭa morgaŭo vi mem vizitu ĝin por propraokule kaj propraĝue konstati, kion la urbo konkrete faras por nia komuna lingvo.

Walter, Gerhard
Urbestro de Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo (Germanio)